

Germana Esperantisto

Der Deutsche Esperantist

Oficiala Organo de
Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.)

kaj de aliaj esperantistaj unuiĝoj.

Aperas duonmonate en du alternantaj eldonoj:
Eldono A (Propagando) — Eldono B (Literaturo).



Offizielles Organ des
Deutschen Esperanto-Bundes E. V.
und anderer Esperantisten-Vereinigungen.

Erscheint halbmonatlich in zwei abwechselnden Ausgaben:
Ausgabe A (Propaganda) — Ausgabe B (Literatur).

Abonprezo: por jaro 2.400 Sm (Provabono por duonjaro, komenciganta en Januaro kaj Julio, 1.200 Sm). Ĉiu eldono aparte: 1.200 Sm (0.600 Sm). Anoncoj: Vidu tarifon sur la kovrilo.

Bezugspreis: für ein Jahr 4.80 M. (Probeabonnement für ein Halbjahr, beginnend im Januar und Juli, 2.40 M.). Jede Ausgabe einzeln: 2.40 M. (1.20 M.). Anzeigen: Siehe Tarif auf dem Umschlag.

Redaktoro: Friedrich Ellersiek, Berlin S 59, Wissmannstr. 46

Alsenditajn artikolojn la redakcio laŭ bezono korektas. Nepresitajn manuskriptojn ni redonas nur, se oni aldonis poŝtmarkon por la resendo.

10^a Jaro No. 6 B

Eldonejo kaj Redakcio: Dresden-A. 1, Struvestr. 40


Junio 1913

Stuttgart.

Dua artikolo.

Sur paĝo 51 en la aprila n-ro B de G. E. mi promesis diri ion detalan pri la ĉirkaŭaĵo de *Schloßplatz*, kaj en la marta n-ro de eldono

tutan konstruaĵon, starigitan laŭ gotika stilo je komenco de la nuna jarcento. En ĝia interno estas du, dum la labortempo konstante funkci-



Stuttgart: Foirejo kaj urbodomo.

A, pĝ. 33, estas priskribita la kongresa klišo. Tie, meze sur la klišobildo, estas videbla la turo de l' urbodomo; ĉi-foje nia unua bildo montras la

antaj liftoj, per kiuj vi povas senpage vertikale traveturi ĉiujn etaĝojn, sed se vi deziras ĝui de sur la balkonoj sub la tura horloĝo ravan as-


pekton de la urbo ĉirkaŭanta, vi nepre devas uzi viajn piedojn, ĉar tien ne portas iu lifto. Tamen vi devas paĝi 20 pfenigojn, sed: la kvar bildoj vidotaj vin kontentigos. Ĉiu balkono estas apartigita de la najbaraj per muro, konkavkurbe supreniĝanta al la turetoj, kiuj ornamas la angulojn de la pli supraj etaĝoj. Tiel la kvar urbobildoj estas kvazaŭ enkadritaj kaj efikas tial bonege. Oni rajtas supreniri ĝis la plej altaj fenestroj, sed mi ne konsilas al vi fari tion, ĉar la loko tie ne estas aranĝita por aspekto. Vi ŝparos viajn fortojn, oni bezonas ilin por esplori urbon, ne konatan ĝis nun. Maldekstre, malantaŭ la urbo-domo, troviĝas *no-ve konstruita kvartalo* de la malnova urbo, oni forigis domaĉojn, konstruis fierajn domojn, kiuj prezentas kelkajn interesajn vidaĵojn. La poŝtkartserio, eldonita de nia grupano Ziegler, montras da ili. (Vidu Eldono A, Majo, 76.)

Ni nun iru al la *malnova kastelo*, jam iomete priskribita en eldono A pĝ. 33. Meze sur la ilustraĵo vi vidas la altan grafan kastelon, kies angulojn duko Christoph poste provizis je dikaj turoj. La korto de tiu kastelo prezentas belegan aspekton: maldekstre, ne videble sur la bildo, troviĝas enirejo al ŝtuparo kun tre malaltaj ŝtupoj, sur kiuj la dukoj povis rajdi ĝis la dua etaĝo. Tie estas altano, de kiu oni havas belan vidon al *Stiftskirche* kaj al la monumento de Schiller (vidu pĝ. 50), kiu staras meze de *Alter Schloßplatz*.

Nun bonvolu denove kompari la planon (pĝ. 51 B): Sube maldekstre vi vidas la ĵus citi-

tajn preĝejon kaj kvadratbazan monumenton. Se vi iros dekstren, laŭ la malsupra kadra linio, trans la granda placo, vi venos antaŭ la *novan arteks- pozejon*; antaŭ malmultaj tagoj oni inaŭguris ĝin per artekspozicio, kiu atendas vian viziton. Pri tiu konstruaĵo oni jam multe riproĉis, mal-laŭdis kaj mokis. Oni koniĝis pri ĝi multajn

mankojn aŭ erarojn pri la eksterajo, dirante ke de antaŭe ĝi similas al krematorio; de la flanko kontraŭ la katolika preĝejo (markita sur la plano per kruco) ĝi memorigas la reĝan ĉevalejon, kaj ĉe la kontraŭparka flanko ĝi aspektas kiel cirko-konstruaĵo. Defendantoj diras, ke la tuto prezentas novan stilon, kiun oni pli malfrue juste ŝatos, kaj la kupolo (de ekstere ne sufiĉe altiĝanta el la ĉirkaŭantaj partoj de l' konstruaĵoj) bone efikas, se oni ĝin rigardas de sur la altaĵoj ĉirkaŭ la urbo. Tial mokemulo rakontis, ke du malkontentuloj sin levis iam per balono super la urbon, kaj, okaze rigardante al la nova ekspozicio, ili konstatis, ke el sufiĉa alteco la tuto mirinde aspektas, kaj ĉiuj iliaj duboj kaj riproĉoj antaŭ-



Stuttgart: Malnova kastelo.

aj silentiĝis.

Karaj vizitontoj de nia kongreso: estas ja eble, ke vi dum tiu tempo vidos super nia urbo Zeppelinan aerŝipon, (ĝi iafaje vizitas la urbon), sed tion mi ne povas promesi al vi, nek tion, ke vi mem el balono povos ĝui aspekton al la artekspozicio. Tamen venu, por mem formi al vi juĝon pri ĝi, precipe ankaŭ por rigardi la vidindan ekspozicion mem. La interno de l' konstruaĵo estas, laŭ komuna diro, tute laŭcela. Ni esperas, ke ni povos havigi al niaj gastoj rabatitan prezon por eniro.

Dekstre, sube sur la plano vi legas „Parko“. Tio estas la reĝa parko „Anlagen“, kiu etendiĝas laŭlonge ĝis Cannstatt, kaj pri kiu vi jam legis sur paĝo 66. Pli frue tiu bela ĝardenajo, alirebla senpage de tagiĝo ĝis noktiĝo, estis pli larĝa, sed unue la du novaj teatroj, kaj poste la konstruo de la nova stacidomo kun ĝiaj fervojoj forprenis konsiderindan parton de ĝi. Tamen, precipe per la teatroj, ĝi ricevis novan ornamon. Malmultaj urboj havas tiel belegan ĉirkaŭaĵon por siaj teatroj.

Nia tria ilustraĵo montras kelkajn el la monumentoj, kiuj troviĝas en la parko. Supre estas la *Hylas-grupo*. Ĝi prezentas la junan Hylas, kunulon de Heraklo, kiu, dum militiro de l' Argonaŭtoj, iris al



Stuttgart: El la reĝa parko.

Laŭdegante siajn landojn
pro grandeco kaj valor',
la princar' germana sidis
en la Worms'a hal' de l' glor'.

Ĉiu el la princoj laŭdis la bonojn de sia
lando, kaj fine:

Diris Eberhard, „Barbgrafo“,
Virtemberga la karul':
„Grandajn urbojn mi ne havas,
montarĝento estas nul'.

Sed valoran mi posedas:
en arbar' eĉ granda plej,
ĉiu samlandana sino
estus mia ripozej'.”

Kaj la princoj kune kriis:
La plej riĉa estas vi!
Barba grafo, via lando
eĉ juvelojn portas ĝi!

*) Tiu poemo en Esperanta traduko troviĝas en la nova kantlibreto, eldonita de nia grupano Ziegler.
Pr: 0.100 Sm. + sendkosto.

fonto, por tie ĉerpi akvon, sed la najadoj, en la akvo loĝantaj, lin rabis pro lia beleco. Jen, kion naivulo pensas pri tiu grupo, se neniu estas, kiu klarigas la aferon: Iu kamparano, vidante ke la virinoj estas nudaj, supozas, ke ili estas bedaŭrindaj idolaninoj, kaj li diras al sia edzino: „Jen la apostolo Paŭlo, kiu predikas al idolanoj“. Ankaŭ pri la *ĉevalbridantoj*, meze de nia ilustraĵo, oni rakontas aferojn pri la malfeliĉo de l' skulptisto, kiam li ekkonis, ke li ja forgesis skulpti langojn al la ĉevaloj. La plej ŝatata de ni virtemberganoj el la tri monumentoj estas la *Eberhard-grupo*. Ĝi ilustras strofon de la Uhland'a poemkanto.*) „Preisend mit viel schönen Reden“:

Kiel ni povas imagi kaj klarigi al ni la kuracefikon de la varmo?

De Dr. med. Wilhelm Winsch.

La homa korpo, same kiel la besta kaj la kreskaja, estas konstruita de la naturo tiel, ke ĝi ja entenas forton, kiu ĝin funkciigas, kaj kiun oni entute nomas vivoŝorto; sed per tiu ĉi forto ĝi ne povas funkcii sola, el si mem, ĝi bezonas konstante la alkondukon de nova forto de ekstere. Ĉi tiuj fortoj, kiuj eniĝas en ĝin de ekstere, povas esti kaj materiaj kaj spiritaj. La homo ne vivas nur de pano, kiel la granda profeto de Nazareth jam siatempe tre prave diris, sed per ĉia vorto de Dio, aŭ, kiel ni nun dirus: la homo ne vivas nur de materia, sed ankaŭ de spirita nutraĵo. Estas tio, kio la homon distingas de ĉiuj ceteraj vivaĵoj, ke li bezonas ankaŭ spiritan instigon. Cetere ankaŭ ĉe la superaj bestoj ni ja vidas, ke ili estas akceptemaj por spiritaj instigoj; estas konata fakto en zoologiaj ĝardenoj, ke la superaj bestoj pli bone prosperas, se oni aranĝas bestludejon, kiel tio okazis antaŭ kelkaj jaroj en la Berlina zoologia ĝardeno. Do ankaŭ en tiu ĉi afero inter homo kaj besto estas nur diferenco de la grado; sed tamen, tiel evidenta, kiel ĉe la homo, la bezono pri spirita nutraĵo ne estas ĉe neniu besto.

Sed hodiaŭ mi ne volas pritrakti la spiritajn fortojn, kiuj influas la homan vivon, sed nur la materiajn. Kaj por tio ni unue devas atenti la nutraĵon kiel tiun materian forton, kiu al ĉiuj vivaĵoj fundamente ebligas la vivon. La nutraĵo sur nia tero estas hodiaŭ nenio alia ol provizita sunenergio, kiu unue amasiĝas en la kreskajo kaj el ĝi transiras en la bestan kaj homan regnojn. Pli antaŭe oni kredis, ke la nutraĵo servas nur al la ŝtofsanĝo, t. e. ke ĝi estas uzata por la anstataŭigo de la ŝtofoj, ĉiutage konsumitaj de la korpo; sed tiu ĉi opinio ĉe pli preciza ekkono montriĝis ĝusta nur malgrandparte. Nur ĉirkaŭ 5% de la nutraĵoj asimilitaj ĉe la digesto en la korpan internon, servas al la ŝtofsanĝo. La ceteraj 95% de la nutraĵoj, kiujn la korpo akceptas en la limfoj kaj sango, servas al tute alia celo, nome al la fortoŝanĝo. La korpo similas akumulaton, kiu povas entenigi certan kvanton da forto kaj poste ankaŭ povas ĝin ree fordoni de si. Tiel la korpo estas provizata kiel akumulatoro per la forto, amasiĝinta en la nutraĵo, kaj kapabligata por siaj ĉiutagaj forteldonoj. Ĉiu korpo havas certan kvanton da forto, pri kiu ĝi ĉiutage povas disponi, kaj tiu ĉi forto-kvanto estas precize tiom granda kiom la forto-kvanto, kiu ĉiutage estas alkondukata per la nutraĵo.

Ni ĉiuj scias, ke la korpo por iom da tempo povas ekzisti eĉ sen nutraĵo. La fastkuracoj tion pruvas. La malnova rakonto de la Biblio pri kvardek-taga fastado, pri kvardek-taga sindetenado de nutraĵo, escepte de la akvo, montriĝis tute vera per la modernaj fastkuracoj. Sed la fastkuracoj povas esti aplikataj kun sukceso nur tiom longe, kiom la korpo ankoraŭ de pli malfrue entenas amasiĝintajn rezervofortojn. Se tiuj ĉi estas konsumitaj, la vivo-grava provizo de la korpo mem estas ekuzata, kaj en tiu okazo ne daŭras longe, ĝis la morto venas; en tio espereble la plej radikala profeto de la fastkuracoj, kiaj hodiaŭ ekzistas diversaj, trovas siajn limojn. Mi ne volas nei per tio, ke la fastado estas tre ŝatinda helpo por la pensanta kuracisto, ĉar ĝi helpas forigi malnovajn, malbone konsumitajn ŝtofojn, kiuj amasiĝis en la korpo kiel malsanigaj ŝtofoj; pro tio mi mem ĉe mia klientaro tre volonte kaj ofte aplikas fastkuracojn kun tre bona sukceso. Ĉi tie mi nur volas averti kontraŭ senkritika ĵurado je tiu metodo, kiun oni kredas sole feliĉiga.

Sed ni revenu al nia ĉefa temo.

La demando pri la fortobalanco estas unu el la plej gravaj por la tuta homa vivo. Nur tiu homo estas konkurkapabla en la batalo je l'vivo, kiu ĉiam havas sufiĉe da fortoj por fordonado. Povas alproksimiĝi al mi la plej granda malfacilaĵo; se mi havas pliajn kaj pli bonajn fortojn, ol la cirkonstancoj ilin postulas, mi ĉiam restas venkanto. Tial la demando pri la ĝusta fortobalanco estas fundamenta por la vivarto. Ĉiu feliĉo, ĉiu ĝojo kaj ĉiu sukceso en la vivo decidiĝe dependas de ĝi.

Ĝis nun oni ĝenerale kredis, ke oni nur per la nutraĵo povas alkonduki al la korpo materiajn fortojn, do, ke la fortetato de la korpo, krom de ĝia saneca forto, estas sole dependa de lerta alkonduko de nutraĵo. Sed per la nutraĵo, kiu estas ĥemia energio, oni povas labori nur ĝis certa limo. Se oni prenas tro multe da ĝi, oni ne plu fariĝas pli forta, sed kontraŭe pli malforta, ĉar oni postulas tro grandan laboron de la digestaj organoj kaj per tio ilin faras malsanaj. Kaj tamen estus bone, precipe ĉe la altgradaj postuloj de nia hodiaŭa vivo, se estus eble, utiligi al la korpo ankoraŭ aliajn fortofontojn. Per tio altiĝus nia enspeza konto, kaj kompreneble ni ankaŭ nur per tio havus la eblecon, elspezi pli multe.

Ĉi tiu ideo kondukis min al la eltrovo de mia varmokulturo. Mi diris al mi: Se la korpo povas esti provizata je forto per la nutraĵo, kiu ja estas nenio alia ol ĥemia energio, ĉu tio ne estas ebla ankaŭ per fizika vojo? Kaj por tiu okazo ŝajnis al mi, ke tiu forto, kiu sin plej bone prezentas al ni, kaj kiu estas ankaŭ plej konforma al nia vivo, estas la varmo. La

homo ja origine estas la infano de tre varmega klimato. En la tempo, kiam li ekestis ĉi tie sur la tero, do proksimume en la mezo de la terciara epoko, la tuta tero ĝis la polusoj estis bone hejtita, tropika paradizo. La varmo, kiu hodiaŭ ankoraŭ estas en la terinterno, tiam penetris ankoraŭ ĝis la tersupraĵo, kio hodiaŭ ne plu okazas, kaj tial la tero tiam estis granda, ankaŭ de malsupre hejtita kreskigejo. Sed iom post iom la tero pli kaj pli de sia propra varmo elradiis en la malvarmegan universon, kaj tiamaniere ekestis klimata ŝanĝo, kiu kondukis al la statoj, kiujn ni hodiaŭ havas sur la tero. La hejtado de malsupre ĉesis, kaj ĉiu varmo sur la tero venas ankoraŭ nur de la suno (aŭ de la karboprovizoj, konstruitaj en pli fruaj epokoj per la propra varmo de la tero kun helpo de la kreskaĵoj). La plej granda manko, kiun la homo havis per tio, estis tiu de la varmo. Laŭnature li estas aranĝita por pli granda kvanto da varmo, ol li hodiaŭ ricevas en niaj klimataj statoj, eble eĉ en la tropikoj; kaj tial li devis, se li ne volis pereji je tiu ĉi manko, krei por si varmokulturon, per kiu li anstataŭigis la perditan varmonaturon. Tio okazis per la eltrovo de la fajro, per vestado, loĝejo, hejtado, lito, per manĝado de viando kaj trinkado de alkoholo; la du laste nomitaj precipe per sia varmovaloro estas utilaj por homo de certa kultura ŝtupo.

Ke la varmo estas tia forto, per kiu oni povas provizi sian korpon kaj plibonigi sian fortetaton, tio rezultas el la sekvanta eksperimento. Se iu havas stomakan kataron, la stomako ne estas tiom laborkapabla kiom en sana stato. Certajn manĝaĵojn, kiuj neniel malhelpas sanan stomakon, ĝi ne plu povas digesti sufiĉe aŭ sen malagrablo por la homo. Tial ankaŭ la tuta homo ĉe tio sin sentas iom malforta, ĉar la malsana stomako ne plu permesas, enkonduki en la korpon tiom da fortoj kiom kutime. Sed se oni post la manĝo metas sur la ventron de tia stomakomalsana homo varmegan botelon, tielnomatan ventrovarmigilon aŭ gumobotelon kun varmega akvo, aŭ termoforon aŭ de kelka tempo ankaŭ elektran varmokompreson, oni povas observi, ke la malsana stomako subite fariĝas pli laborkapabla sub la influo de la varmo. La malagrabloj malpliĝas, la stomako povas plenumi pli grandan kaj pli malfacilan laboron, kaj se oni daŭrigas tion kune kun aliaj bonaj rimedoj, oni baldaŭ atingas, ke la stomako ricevas sian plenan laborforton.

El tiu ĉi ekzemplo oni vidas evidente, kiel la korpo per la efiko de la varmo estas provizata per forto, kiu ĝin kapabligas por pli granda laboro. Estas, kvazaŭ oni havus veturilon kun unu ĉevalo, kaj tiu ĉi veturilo venas en

malfacilan situacion, fiksveturiĝinte en profunda marĉo, tiel ke ĝi ne povus daŭrigi sian vojon. Tiuokaze ne helpus io alia ol aljungi ankoraŭ duan ĉevalon. Tiel la homoj por sia korpomastromado ĝenerale uzas nur la unu ĉevalon, kiun mi volas nomi nutra ĉevalo — por resti ĉe metaforo — dum eventuale estas necesa ankoraŭ dua ĉevalo; la varmoĉevalo.

Post tiu ĉi klarigo certe ĉiu senpene komprenos, kiamaniere oni per la varmo povas plialtigi siajn fortojn, kaj tio valoras ne nur por unu sola organo kaj por la malsana homo, sed ankaŭ por la tuta korpo kaj por la sana homo. La sanulo sin daŭre konservas pli kontraŭstarema kaj pli laborkapabla, se li scias sin bone trakti per varmo. La multaj elĉerpiĝaj statoj, kiujn oni nuntempe vidas, kaj je kiuj laŭ mia opinio pereas la plej multaj homoj, estas ĉiuj nur statoj de daŭra, pli kaj pli kreskanta deficitito. Sed ofte ili ne nur venas el tio, ke iu tro multe elspezas, sed ankaŭ el tio, ke li tro malmulte enspezas; ĉar la efektivigo de deficitito dependas ne nur de la elspezo, nek nur de la enspezo, sed de la rilatoj de unu al la alia. Kiu pli multe enspezas, tiu povas ankaŭ pli multe elspezi, sen ke li devas timi deficiton en formo de longedaŭra malsano.

Do, se oni volas plibonigi siajn vivon kaj sukcesojn, oni antaŭ ĉio devus atenti pri tio, ke la korpo povu plialtigi siajn enspezojn. Plej laŭcele por la korpa bilanco tio okazas, krom per laŭnatura nutraĵo, antaŭ ĉio per ĝusta alkonduko de varmo. Kiamaniere tio estas farbla por la malsanulo, ĉiu povas detale legi en mia verko „Pri varmokulturo“.)

Por la sanulo mi ankoraŭ aldonas ĉi tie, kiel ekzemplon por bona varmobilanco kaj kiel necesan kondiĉon por daŭre sana kaj sukcesplena vivo, la jenon:

Dum la tuta jaro dufoje en ĉiu semajno varmega duonbano kun kovrado, escepte eble dum la plej granda somera varmeĝo, kiam oni kompreneble ne bezonas artefaritan alkondukon de varmo. Ĉi tiu duonbano estas farata tiamaniere:

En grandan banujon oni verŝas duone tiom da akvo, kiom oni bezonas por plenbano, tiel ke la ventro kaj la kruroj estos kovritaj. Oni sidas en la banujo. La varmeĝo de la bano estu 42 ĝis 45° C. Oni prenu malmulte da akvo kaj la plej malaltan varmogradon, ĉe kiu oni ŝvitas.

*) Ĉi tiu grava verko nun estas tradukata Esperanten kaj aperos fine de Julio. La germana titolo estas: „Über Wärmekultur, eine neue Methode, den Körper mit Kraft zu laden“. Verlag Lebenskunst-Heilkunst. Berlin SW. 11, Halleschestr. 20. Pr: 0.60 M. = 0.300 Sm.).

Nun la bankuvo estas kovrata tiamaniere, ke oni metas sur ĝin unue kelkajn tabulojn, poste litotukon kaj fine lanan kovrilon. Se la banĉambro estas tre varma, aŭ en somero, oni povas ŝviti en tute nekovrita banujo aŭ meti nur litotukon sur la tabulojn. Ĉe la fino oni ankaŭ povas kovri la kapon per la litotuko. La daŭro de la bano estu 10—20 minutoj, poste oni malkovru la bankuvon. Nun oni sin denove metu en la akvon kaj laŭplaĉe malvarmiĝu dum 10 minutoj malrapide ĝis ĉirkaŭ 34° C, iom post iom aldonante malgrandan kvanton da malvarma akvo.

Krom tio oni uzu en malvarmetaj tagoj some-raj kaj dum la tuta vintro ĉiutage almenaŭ unu horon la varmegan *ventrovarmigilon*.

Lada aŭ guma botelo estas plenigata per bolanta akvo, kaj seke envolvata en kotonon aŭ krudan silkon. La tiamaniere preparitan botelon oni metu sur la ventron kaj ĉirkaŭvolvu ĉi tiun per lano, por ke la botelo ne forŝoviĝu. Tian botelon oni kutime surhavas unu horon, kaj poste la ventro estas malvarme lavata per la mano.

Plej bone estas, se oni ripozas kun tiu ĉi ventrovarmigilo unu horon tagmeze, senpere post la tagmanĝo.

La plej grandiozan varmoteknikon ni nun havas dank' al la elektro, pri kio mi petas legi en la ĉapitro „Pri varmega botelo“ en mia verko „Pri varmokulturo“.

Kiu aĝas tiel, kiel mi ĝin diras en la ĉapitro „Pri vivarto“ de mia verko, t. e. kiu metas en ĝustan rilaton la elspezojn kaj la enspezojn kaj plej eble altigas la enspezojn, al tiu mi senhezite povas promesi pli riĉan, pli gajan kaj pli feliĉan vivon ol li havis antaŭe.

Tre mirinde kaj atentinde ankoraŭ estas, ke la kunigo de la nutraĵo kun la varmo ne nur sekvigas simplan sumiĝon de ambaŭ fortoj; sed la alkonduko de fizika forto, kia estas la varmo, havas la rimarkindan sekvon, ke la hemia streĉforto de la nutraĵo estas multe pli bone utiligata kaj krom tio, ke formiĝas pli bonaj hemiaj valoroj. Sekve tiamaniere estas enigataj en la korpon pli bonaj kaj pli delikataj konstru-ŝtofoj, kaj tiel ĝusta varmokulturo nepre kondukas al pli alta evoluo de la korpo, ĉar ĝi helpas produkti pli bonan nutrofundon en la sukaj de la korpo. Do per tio okazas en la enspezado ne nur ŝanĝo de la kvanto, sed ankaŭ de la kvalito: la enspeza konto fariĝas per la varmo pli bona laŭ kvanto kaj kvalito.

Stranga fakto, kiun oni ĝis nun ne povis klarigi, estas jena: Se en somero fariĝas tre varme kaj sufoke, multaj homoj perdas la apetiton kaj ne povas manĝi tiom multe kiom alitempe, se estas malpli varme. Laŭ la antaŭaj pritraktoj ĉi tiu konata aperaĵo klariĝas tre

facile. Ĉe granda ekstera varmego la forto necesa por la korpo estas donata per la varmo, kaj pro tio la korpo bezonas pli malmulte da nutraĵo. Ankaŭ tio estas grava fakto, kiu sin devas montri tre utila por la edukado de l'homo al pli granda modereco en la manĝado. Se mi volas instigi homon al tio, ke li manĝu pli modere, mi alimaniere devas alkonduki al li forton, kaj tio okazas plej bone per la varmo. La varmo havas krom tio ankoraŭ la sukceson, ke ĝi, ekzemple en formo de varmega botelo, pli streĉas la stomakon, kaj la streĉita stomako pli precize rimarkigas, kiam ĝi havas sufiĉe, kaj tiel la streĉeco de l'stomako estas grava antaŭkondiĉo por bona kaj nedevigita modereco.

Ĉi tiuj pritraktoj jetas eĉ gravan lumon al la tuta estonta evoluo de la homo. La estonta homo sin provizos proporcie je pli multe da varmo kaj pli malmulte da nutraĵo ol hodiaŭ, kaj tio devas ankaŭ influu lian korpan kaj spiritan staton. La varmo, kiel pure etera forto, helpas naski pli delikatajn kaj pli noblajn homojn ol la maldelikata energio de la nutraĵo. Kiu havas okulojn por tio, tiu jam en nia hodiaŭa vivo povas precize distingi ĉi tiujn du diversajn tipojn. Laŭ mia praktika sperto mi supozas, ke oni proksimume unu trionon de la ĉiutaga fortalkonduko povas doni per varmo.

Sed la varmo havos ankoraŭ tute precipan kaj benriĉan influon je la tuta popola saneco: Ĝi pliigos la purecon ĉe ĉiuj homoj tiom, ke ĉiu malpuraĵo malaperos el la homa vivo kaj per tio ankaŭ la popolmalsanoj. La popolo ne estas hidrofobia, ĝi timas nur la malvarman akvon. Se oni disponigas al ĉiu popolano sufiĉe grandan kvanton da varmo, tiel ke li ĉiutempe povas prepari al si varmegan akvon, ĉiu homo trovos ĝojon en tio, lavi sin kiel eble plej ofte. Ankaŭ tion ni atingos pere de la grandioze progresinta elektra tekniko. Ĉiu homo ricevos post plej malfrue cent jaroj per la elektro tiom multe da forto kaj varmo en sia mastrumado, ke li estos kapabla, plenumi ĉiun bonan kulturtaskon. Ne plu ekzistos fajro en la mastrumado, sed oni per elektro kuiras, rostos, bakos, hejtos kaj faros varmegan akvon, kiom estos necese, kaj cetere oni ankaŭ havigos al si per varmokompresoj kaj elektraj poŝfornoj*) la varmokvanton, kiun nia korpo bezonas por sia plej alta disvolvigo de forto.

*) Jam nun ekzistas poŝforno, kiun mi tre rekomendas al la ŝatantoj de la varmokulturo. Guste uzate ĝi multe helpas plibonigi la sanecon kaj agrabliĝi la vivon. La japanoj havas jam de longe ion similan kaj tamen neniel estas malharditaj. Kiun interesas la demando pri ĝusta hardiĝo, tiu legu mian verkon „Pri varmokulturo“. La poŝforno estas dum la vintro bonega anstataŭilo por alkoholo kaj viando.

Tiel la elektro estas granda socia forto, kiu nin helpas konduki la homon al tute ne antaŭvidita evoluo, kaj ĉio ĉi tio necesigas, akcepti en la kulturprogramo de la homaro ankoraŭ novan, gravan kaj fundamentan punkton, nome la rajton je varmo.

La Breslau'a festaro je la memoro de la liberigaj militoj.

Majo ĝis oktobro 1913.

Unua artikolo.

Kiel lulilon de la renaskiĝo de Prusujo antaŭ cent jaroj — kaj pere de tuta Germanujo — oni prave konsideras la urbon *Breslau*. Ĉi tie ekflamis la arda patriotismo, ĉi tie ekvekiĝis denove la tuta fiereco, la tuta potenca forto de longtempe subpremita popolo. Kio estis prikantita de entuziasmaj poetoj, komencis realiĝi en Breslau. Je la memoro de la tiamaj gloraj tagoj oni festas nun, en nia pacema kaj prospera tempo, inde la estintecon: „dankema kontraŭ la amiko, justa kontraŭ la malamiko de tiam“.

Laŭ la juĝo de aliurbaj kaj eĉ eksterlandaj gazetoj kaj ĵurnaloj la grandega tasko, kiun surprenis nia urbo, estas solvita multlaŭinde. Meze en la malnova beleĝa *Sajtniga* parko (kiun tiom admiris niaj karaj fremdlandaj samideanoj, travojaĝintaj Breslaŭon en Aŭgusto 1912), kies arbogigantoj formas poeziplenan kadron por la viglemova bildo de l' ekspozejo, estas starigitaj diversaj konstruaĵoj en kvietaj, harmoniaj formoj. Ilin superstaras la por daŭra uzado destinita tielnomata *Jarcenta halo*, konstruita de l' urba konstrukonsilanto *Berg*; ĝia kolosa grandeco ankoraŭ respekte alten rigardigos niajn posteulojn. La kupola arkiĝo havas 67 metrojn, dum la ĝis nun plej granda konstruaĵo, la Panteono en Roma, ne havas pli ol 43 metrojn da kupola vasteco. La interna ĉambrego estas servonta por grandamasaj popolkunvenoj, teatraj, muzikaj kaj sportaj prezentadoj — eble iam por esperantista mondkongreso, ĉar ja estas sufiĉa loko por 10 mil personoj. Kian impreson farus nia „Espero“ ludita sur orgeno kun 1400 bloviloj, kiu rilate al grandeco okupas la unuan lokon en la mondo!

Ĉirkaŭ la ĉambrego troviĝas ringo de kabinoj por malpli ampleksaj ekspozicioj, kia jam unu okazis de ĉarmegaj printempaj floroj. Al ĝi estis senditaj kreskaĵoj ne nur el ĉiuj partoj de Germanujo, sed eĉ salutis nin „per la floro“ la speciale al esperantistaj koroj simpatia Nederlando.

Antaŭ la festhalo etendas sin sorĉe bela, senmova, artefarita lago, respegulante dum

vespero la mil kaj mil flametojn el la restoracio, terasforme apogita al la jarcenta halo.

La verdira ĉefaranĝo de la tuta festaro, la historia kaj kulturhistoria ekspozicio, estas instalita iom pli flanke en speciala, 4-kupola konstruaĵo, elpensita de l' estro de la ĉi-tiea artakademio, profesoro *Poelzig*. 56 ejoj diversformaj montras la tutan materialon. Helpe de pruntitaj objektoj el ĉiuj germanlingvaj landoj kaj la tiam kun ili ligitaj ŝtatoj restariĝas antaŭ la rigardanto la grandaj ŝtatgvidantoj, la armlaro, la okazintaĵoj kaj la kulturo tiamaj — interesege bildo kombiniĝinta el mil detalajoj; en pluaj artikoloj estu provate, almenaŭ parton de ili fiksi por la afabla legantaro. Multe da belajoj krome enhavas ankoraŭ la aliaj fakoj de la ekspozicio, el kiuj mi citas ekzemple tiujn por tombeja arto, la historiajn ĝardenojn kaj la kolonian ekspozicion. En preskaŭ neinterrompita vico dum la ekspozicia tempo okazos festaranĝoj, pli ol ducent kongresoj, speciale verkita teatraĵo de *Gerhardt Hauptmann* kaj ankaŭ — Esperanto-tago.

Ne forgesita estu la surprize originala maniero, en kiu estas interligitaj la festhalo kun la ekspozicia domo: per duonrondajo de duvica kolonara trairejo, nomita *pergola* laŭ la itala vorto, kiu signifas laŭbon aŭ laŭban trairejon superkovritan per vinberrampajoj. Malrapide laŭirante la internan vojon de 800 metroj da longeco, la okulojn ĉiam direktante al la florbudoj antaŭe kun ilia nekredeble diverskolora tuliparo, al la klaraj linioj de la konstruaĵoj, oni kredas migri en ia revata orienta fabellando.

Fine mi rememorigu, ke nia lingvo ludis kaj espereble ankoraŭ ludos gravan rolon en la ekspoziciarejo. La aniĝo de la urbo Breslau al U. E. A. kaj la eldono de Esperantigitaj prospektoj estas nun sekvata de aperigo de gvidlibroj tra Breslau, por kiuj la urbestro disponigis 300 Markojn. Ĉar laŭbezone ankaŭ dupiedaj gvidantoj estas plezurege pretaj, por doni ĉiujn informojn, estas vere malfacile, trovi pruvigan pretekston, por ne veni mem kaj konvinkiĝi pri la multnombraj ĝuoj. Do, karaj germanaj kaj negermanaj gesamideanoj, aŭ venu, se vi povas, aŭ atendu kaj atentu la sekvontajn sciigojn pri speciala Esperanto-tago en la ekspozicio. Ĉiuokaze, ĉar vi certe ĉiuj intencas tiamaniere pruvi, ke Esperanto meritas esti konsiderita de la ekspozicia kaj urba estraroj, mi kore ekkrias: „Ĝis revido aŭ konatiĝo en Breslau-Schaitnig!“

Julie Wolfson.

*) La Esperantaj gvidlibroj kaj prospektoj estas haveblaj por ĉiu interesulo ĉe Esperanto-Lehr-Anstalt, Breslau, Augustastraße 23.

Kiom kostas kiso?

De Hans Steinberg, Göttingen.

Kaspero, riĉega bienulido, renkontis dimanĉe en la urbo la beletan najbarfilinon. Tio ne okazis malofte; ĉar en la kampara preĝejo estas nur unu meso frumatene, kiun legas aliloka pastro aŭ monaĥo. Nur la gemaljunuloj, kiuj ne povas marŝi malproksimen, kaj la geservistoj, kiuj devas dimanĉe kiel ĉiam plenumi la dom- kaj brutservojn, vizitadas tiun senkantan Diservon. La aliaj ĝejunuloj preferas iri al la solena meso en la urbo, kiu ne okazas tiel frue. Frue leviĝi devigas ilin ĉiuj labortagoj. La dimanĉo estas ripoza kaj festa tago; festotago bezonas festhumoron. Tiun ne donas al ili la kamparo, kiu ja estas ilia laborejo. Sed la urbo havas ĉiam dimanĉan aspekton por kampuloj, la urbanoj vidiĝas ĉiam en dimanĉaj vestoj. Tial la urbo allogadas la kamparanojn, kiel la kamparo la urbanojn por dimanĉa distriĝo. Krom tio la dimanĉa pilgrimado al la urba katedralo donas al la ĝejunuloj la plej bonan okazon por senĝena renkontiĝo en la urbo mem kaj dum la irado tien kaj reen.

Tiun ĉi okazon uzadis ankaŭ kiel eble plej ofte Kaspero kaj Marinjo, la beleta najbarfilino, kiu lin amis kaj ĉiam ĉe la disiro demandis lin pri la proksima dimanĉo. Kaj kiu ne promesus al tia demando, volontege iri urben kaj bedaŭregus, kiel Kaspero, ke la venonta dimanĉo jam ne estos morgaŭ?

Kaspero kaj Marinjo ne memoris, kiamaniere ekkaptis ilin la amo; eĉ ĝis la lasta tempo ili ne sciis kaj neniam pripensis, ĉu ĝi ekkaptis ilin. De post la knaba tempo ili estis ĝeamikoj kaj dimanĉe pilgrimadis kune al la urbo. Sed kiam la gepatroj de Kaspero, kiuj jam estis maljunaj, atentigis sian filon pri kelkaj profitaj edziĝeblecoj, li unue ekkonis, ke neniu alia povos esti lia edzino ol Marinjo; kaj de post tiu tago li pli kaj pli sentis sin enamiĝinta. Li nun pli ol antaŭe tenis kaj premetis la dolĉan maneton de Marinjo ĉe adiaŭo kaj renkonto, kaj Marinjo respondis tiujn karesojn; sed iajn pliajn kuraĝigojn ŝi ne donis al li. Tial la afero ne marŝis laŭ la deziroj de Kaspero. Li estis kutimiĝinta, nur preni aŭ respondi kaj atendi, ĝis kiam Marinjo donis aŭ demandis. Sed kvankam li esperis kaj atendis, tamen Marinjo nun ne donis eĉ la plej malgrandan antaŭenpuŝon. Li preskaŭ ne plu komprenis ŝin. Ĉu ŝi ne amis lin? Ĉu ilia multjara amikeco vere por ŝi nur estis amikeco kaj bonnajbareco? Certe ŝi lin ne sopiris kiel li ŝin, kiu lin maldormigis ĉiun nokton! Ho, se ŝi nur donus unufoje certecon al lia dubeto, nur iometan esperon al lia deziro!

Hodiaŭ dum la tuta meso li preĝegis al Dio, ke Marinjo respondu lian amon. Kaj en feliĉa konfido li jam revis pri la unua kiso, kiun ŝi donos al li dum la hejmvoyo. Kuraĝe li intencis nepre demandi, peti ŝin.

Marinjo kaj Kaspero iris tra la strato kaj haltis antaŭ moda magazeno, por rigardi la elementaĵojn en la fenestroj. Kaspero montris iun belegan ĉapelon kaj demandis ŝin, kion ŝi donus al li, se li donacus ĝin al ŝi. „Mi ne bezonas ĉapelon“, ŝi rediris iomete ofendite. Li ruĝiĝis kiel la ĉielo matena kaj sentis siajn esperon kaj kuraĝon tre malproksimiĝintaj, ekdubante, ĉu ŝi rifuzis lian donacon aŭ lian intencon eble divenitan. Sed malesperonte li serĉis kaj ekvidis ŝian rigardon tiel amoplenan kaj konfidigan, ke ŝi ŝajnis al li anĝelo plej bonvola. Tamen nur dum la hejmvoya babilado, kiu tute reintimigis ilin, li rekuraĝiĝis daŭrigi sian provon. Serĉe li riproĉetis al ŝi la rifuzan respondon, ĉar li estus jam ĝojeginta pri ŝia kontraŭdonaco; sed por konigi al li lian malprofiton, ŝi bonvolu nun diri, kion ŝi donus al li, se li donacus al ŝi la ĉapelon?

Ili estis solaj sur la vojo, kiun ambaŭflanke limigis arbetaroj. Ĉu ŝi lin komprenus kaj donus al li ne parole, sed buŝe la deziritan respondon?

„Kion povas valori nebezonata ĉapelo?“ ŝi redemandis lin.

„Se vi volas valore egaligi vian donacon al la mia, mi donos al vi dek aŭ cent ĉapelojn, sed bezonatajn.“

Mi bedaŭras, ke mi ne bezonas ĉiujn, por fari al vi la plezuron. Sed ĉu vi scias, kiom kostas unu ĉapelo?“

„Mi pagos, kiom ajn vi volas.“

„Vi do deziras gravegan donacon de mi, ŝajnas al mi.“

Kaspero ekkonis, ke ŝi ne volis kompreni lin, sed li persistis sian celon:

„Volontege mi ankaŭ aĉetos ĝin de vi, diru nur la prezon!“

„Cent mil spesmiloj!“

„Volontege, Marinjo, mi konsentas: do donu al mi unu kison!“

Li volis ĉirkaŭpreni ŝin, sed haltis senvola, ĉar ŝi ne alvenis lin.

„Ĉu vi pensas, ke mi vendas kisojn por mono?“

„Vi estas prava“, respondis Kaspero, kaj ree li provis legi en ŝiaj okuloj, kiuj ankoraŭ montris la saman konfidigon. „Marinjo“, li daŭrigis tutkore poeziplene, „vi konas la rivereton, kiu trafluas mian kamparon. Sur ĝiaj bordoj mi farigos ĝardenon, vere belegan parkon kun ĉiuj floraj kaj arbaj specoj de la mondo. Kaj meze de tiu ĉi natura belegajo mi kon-

struigos la plej belan artstilan vilaon. Mi aldonos ĉevalojn kaj kaleŝon por promene veturi kaj rajdi kaj ĉion pluan vivbezonan kaj dezirotan; kaj tion tutan mi donacos al vi, ke vi tie loĝu kiel reĝino. Tiam mi vizitos vin la unuan dimanĉan sunan posttagmezon kaj alportos la plej bonajn kaj dolĉajn sukeraĵojn el la urbo. Plej bonvole vi invitos min al taseto da kafo, kiun ni trinkos kune en la ombra laŭbo apud la rivereto — kaj tiam, Marinjo, vi donos al mi la kison! Ĉu ne, mia kara?”

„Por la vilao kaj la parko kaj la ĝardeno kaj ĉio kuna vi ankoraŭ ne povos ricevi unu kison de mi.”

„Aŭ pli bone, mi renovigos la apudan dometon, en kiu loĝis miaj geavoj, kiam mia patro edziniĝis la patrino; kaj tie mi enloĝigos miajn gepatrojn, por ke ili povu vivadi senĝene, tute laŭ siaj bezono kaj deziro. Kaj la tuta bieno kun domo kaj ĉio apartenanta estu via propraĵo. Kaj min mem mi aldungiĝos ĉe vi kiel serviston kaj laboranton, kaj kiam mi estos bone engarbejiginta la tutan rikolton vian riĉan, tiam vi donos al mi la kison, ĉu ne?”

„Ankaŭ via tuta bienego kaj ĉiuj riĉaĵoj de vi ne egalvaloras mian kison.”

„Tiam mi vendos ĝin kaj vojaĝos tra la tuta mondo kaj, se vi volos, vi akompanu min, kaj ni serĉos en ĉiuj landoj de la mondo, ĝis kiam ni trovos ion egalvaloran, kion mi aĉetos por vi — ĉu vi tiam diros „sufiĉas” kaj donos al mi la kison?”

„En la tuta mondo vi neniam kaj nenie trovos ion egalvaloran, Kaspero, eĉ se vi vojaĝus tra ĉiuj kvin partoj de la tero kaj ĉiuj insuloj de la maro kaj eĉ se vi konus la vojon al la astroj de l' ĉielo.”

„Vi do neniam volas doni al mi kison, kara Marinjo?”

„Tion mi ne diris.”

„Ĉu vi tamen volos, kara Marinjo? Ho, diru al mi, kiom valoras unu kiso de vi, kion mi devos doni por ĝi!”

„Kaspeĉjo”, ŝi diris kaj aliris por ĉirkaŭpreni lin, „ne serĉu en la vasta mondo, kion vi havas en via koro: donu al mi unu kison!” —

Kaspero certe estus kvazaŭ elfalinta el aerveturilo mezen en la serĉitan paradizon — se en la sekvontaj momentoj li ne tuj estus forgesinta ĉion, kion li revis kaj serĉis.

Du herooj.

Originala novelo de Kurt Sommer, Chemnitz.

Laŭta ĝojo regis en la tuta vilaĝo. La maljunuloj sidis en la drinkejo kaj la infanoj glitveturis sur la brilanta glaciiginta kovrilo de la

vilaĝa laĝeto. La tuta vilaĝo vivis jam dum tri tagoj en venkoĝoĝejo, kiu superis ĉion naturan. En la unua tago, kiam la gravega sciigo flugis tra tuta Bulgarujo kaj ankaŭ venis en la vilaĝon de nia rakonto, oni akceptis la venkosciigon kun trankvila ĝojo, ĉar el la dek kvin viroj, kiuj sekvis la grandan bulgaran armeon, unu jam tuj en la unua batalo devis lasi sian vivon. Tamen la ĝojo superis la malĝojon. En la lernejo la instruisto faris paroladon, laŭdegante la bulgaran armeon kaj la gloran reĝon. En la fino de la parolado li diris solenajn parolojn pri la falinta patro de la malgranda Petro. Poste, kiam li estis fininta, li demandis Petron, ĉu ankaŭ li iam fariĝos tia heroo. Sed tiu ekkriis plorante: „Mi malamegas la militon, kaj malbenon al tiuj, kiuj mortigas unu la alian!” Tiujn vortojn li konstante ripetadis, kiam iu lin alparolis. Li tute ne volis kompreni la necescon de milito kaj li nur havis unu imagon: li vidis turkon sovaĝan, kiu traboras per sia sabro la bruston de la amegata patro, kaj li vidis fluanta la ruĝan varman sangon el lia brusto. — Ho ĉiela patro, kial ĉio ĉi tio estas tiel?

La aliaj knaboj respektis lian malĝojon, sed ili juĝis, ke li ne estas kuraĝa knabo, ĉar li timas la morton! — — —

Petro staris sur la bordo de la laĝeto kaj rigardis malgaje en la sovaĝan infanaron. Subite krevis la glacia kovrilo per tondra krako, kaj la infanoj diskuregis sencele, puŝante unu la alian, ĝis fine ili atingis la bordon. Nur unu knabo kuŝis sur la glacio kaj ne povis forkuri. Per unu kruro li estis falinta en fendon kaj ne povis liberigi sin. Ĉiuj staris kaj vidis tion, sed neniu kuraĝis surpaŝi refoje la laĝeton, ĉar la kovrilo krakadis daŭre kaj la akvo jam fluis super la glacian kovrilon. Minutoj pasis, la infanoj kriis, la knabo sur la glacio baraktis malesperante, kaj la akvo iris ĉiam pli kaj pli alten.

Subite ĉiuj okuloj direktiĝis al Petro, kiu rapide alvenis, rulante antaŭ si malplenan barelon.

Tuj en la momento, kiam li vidis la malfeliĉon, li forkuris por serĉi taŭgan objekton, kaj li trovis tiun barelon. Li ŝtopis sian poŝtukon en la korkotruon, kaj nun li suriris la glacieron. Ofte li falis, sed forte li tenis la barelon kaj atingis la knabon. Li liberigis lin el lia danĝera situacio, kaj ree, post multe da penplenaj minutoj, ambaŭ knaboj atingis felice la bordon.

Fine alvenis geviroj el la drinkejoj. Ili portis ambaŭ knabojn hejmen kaj iu diris: „Fakte, malgranda Petro ankaŭ estas heroo, same kiel lia patro, li tute ne timas la morton!”

Venĝo.

Originale verkita de Carl Schulz, Charlottenburg.

La germana barko „Frida“ veturas de Bremen al Brazilio. La direktlisto de l' ŝipo, Bobender, lasis sian fianĉinon en Bremen. Adiaŭante li ricevis de ŝi pezan pakajon. Kiam li survoje malfermas ĝin, li trovas ses botelojn da bona Jamaika-rumo kaj karton kun la peto, ke li trinku kelkafoje je ŝia sano. Surname, je la naskiĝtago de sia fianĉino, la direktlisto alportas la rumon. Kortuŝite li rememoras la karulinon en la hejmo kaj trinkas de la bona brando unu botelon post la alia. Kiam la suno subiras, Bobender estas ebriega, kaj nur kun granda peno oni povas lin porti en lian kajuton. Indignite kapitano Frederiksen skribas vespere en la ŝiptaglibron: „Direktlisto Bobender estis ebria la tutan tagon“.

Proksiman matenon Bobender legas tion kaj faras riproĉojn pro tio al la ŝipestro.

„Kio okazas surŝipe, devas esti enskribata en la taglibron“, rediras Frederiksen.

„Sed, mi petas vin, sinjoro kapitano —“

„Ĉu vi ne estis ebria, Bobender, ĉu tio ne estas vera?“

„Jes, estas ja vere.“

„Nu, sekve mi ankaŭ devas enskribi ĝin en la taglibron. Komprenu do: kio ajn okazas surŝipe, devas esti enskribata. Kaj trastreki oni ne povas. Tio estas kontraŭ la leĝo.“ —

Unu semajnon poste kapitano Frederiksen devas kuŝi dum unu tago en sia kajuto pro malgrava lezo. Bobender dume prenas sur sin la kondukon de la ŝipo kaj la skribadon en la ŝiptaglibron.

Sekvantan matenon la kapitano trovas la jenan noton en la libro: „La kapitano estis hodiaŭ sobra la tutan tagon“.

„Bobender!“

„Sinjoro kapitano?“

„Bobender, kion vi skribis en la libron?“

„Sinjoro kapitano, vi estis ja hieraŭ la tutan tagon sobra, kaj vi diris al mi, kio estas vera, tion oni ankaŭ povas skribi, kaj kio ajn okazas surŝipe, devas esti enskribata. Kaj trastreki ĝin oni ne povas.“

Tiel Frederiksen do devis esti kontenta, ke lia direktlisto atestis al li lian sobrecon por la dek-kvina de Aŭgusto.

La timo.

Araba legendo.

Rajdanto vojaĝis de Bejruto Damaskon. Survoje li rimarkis en la ombro de palmo sulkoplenan ĉifone vestitan maljunulinon, kiu ploris.

Tremantavoĉe ŝi diris: „Kiu kondukos min al Damasko?“ La junulo haltis, rigardis la malfeliĉulinon kaj, kortuŝita de ŝia malĝojo, li sidigis ŝin surĉevalen, por venigi ŝin ĝis la urbo. Ili ekrajdis. Survoje la junulo demandis ŝin: „Kiu ci estas kaj kiel oni cin nomas, cin, kiu ŝajnas tiel malfeliĉa kaj kies okuloj febre brilas?“ — Amiko, — respondis la maljunulino, mi estas la Nigra Pesto. La rajdanto, tremante pro teruro, penis dejeti ŝin teren. „Senutile! — ŝi diris, — ĉar ankaŭ sen cia helpo mi atingos Damaskon. Cetere, mi ne deziras al ci malbonon. Mi konsentas favori cin rekompence je cia bonkoreco.“ — „Bone, mi alkondukos cin ĝis la urbo, kondiĉe, ke ci neniun mortigos“. — Tio ĉi estas ne ebla; ci nur diru al mi, kiom ci volas, ke mi mortigu? — „Nu, sesdek“. — Sesdek? — Mi konsentas pri tio. — Sed, — diris la junulo, — kiamaniere mi punos cin, se ci ne plenumis cian promeson? — Ci trovos min vespere post la granda moskeo, kaj ci mortigos min. Ili interkonsentis.

Atinginte la celon de sia vojaĝo, la homo ekiris plenumi siajn aferojn. La sekvantan tagon mortis en Damasko dek kvin homoj, la postsekvantan tagon mortis tridek kaj la trian tagon sesdek personoj. Indignite la vojaĝanto ekkuris post la moskeon, kie li trovis la maljunulinon. „Tiamaniere ci plenumis cian promeson? — li ekkriis. — Ci ne devas riproĉi min, — ŝi respondis trankvilavoĉe, — mi akurate plenumis ĝin: la unuan tagon mi mortigis dek kvin, la duan — dudek kaj la trian — dudek kvin.“ — Kaj la ceteraj, sentaŭgulino? — La ceteraj? Ili mortis pro timo.

El franca lingvo tradukis S. Pŝenickij.

Rim. de la red. Tiu ĉi sama rakonto troviĝas ankaŭ en „Unua legolibro“ de Kabe (eld. Ader & Borel, Dresden). Ni publikigas la supran tradukon, ĉar estas tre interese, kompari la du tradukojn, faritajn tute sendepende unu de la alia de du diverslingvanoj. La tekstoj de ambaŭ tradukoj estas rimarkinde similaj, kvankam Kabe verŝajne ne tradukis laŭ la sama originalo.

E. L. A.

**la protektanto de nia
Esperanta literaturo.**

De Charlotte Pulvers. (E. L. A.)

Tiu, kiu multe aĉetas Esperantajn librojn kaj ilin ankaŭ legas, kaj tiu, kiu tre ofte ricevas recen-zotajojn, povas nepre konstati, ke la Esperanta literaturo iom post iom fariĝas la amuza kaj ekzer-cada kampo por la komencantoj kaj nespertuloj en nia lingvo. Ŝajnas, ke post la deka gramatika leciono ekkaptas tiajn homojn speco de fiereco aŭ

la emo fariĝi iomete konata: ili ektradukadas, indifere, ĉu iliaj lingvaj scioj sufiĉas aŭ ne. Se nur la nomo estas presita sur la Esperanta libro kaj ĉi tiu dissendita. Sed ĉu la „faritaĵo“ same ĝojigas la leganton kiel la produktinton — jen la grava demando! Mi tre dubas. Tre ofte, bedaŭrinde eĉ tro ofte, ĝi havigas al la leganto preskaŭ sangajn larmojn! Ve, kiajn stilajn abomenaĵojn oni nun kelkafoje devas legi de tiu aŭ tiu! Ofte en preskaŭ ĉiu linio troviĝas ne nur presaj eraroj, sed ankaŭ multaj gramatikaj kaj stilaj fuŝaĵoj. Kaj por tiaj netaŭgajoj oni eĉ devas pagi! Se verkintoj aŭ tradukintoj ne estas sufiĉe severaj kontraŭ si mem, almenaŭ la eldonisto estu tia kaj malpermesu la presigon de tiaj fuŝtradukoj, kiuj ŝovas la Esperantan literaturon nur en mokindan ŝajnbrilon, kiu pli malutilas al la movado ol ĝi utilas al la literaturo, ĉar la tradukoj estas neperfektaj! Kaj oni vere nur presigu verkojn en plej korekta, plej pura, internacie plej facile komprenebla stilo. Vere ne estas amuze, legi librojn skribitajn en stilo de komencanto, en kiuj preskaŭ ĉiu frazo forpuŝas nur kaj nuligas la ĝuon. Kiom ofte ni jam memorigis pri la servoj de E. L. A., kiu celas la purigadon de nia literaturo je ĉiuspecaj aĉaĵoj! Kial eldonistoj ne rifuzas manuskriptojn, kiuj ne havas la „pasporton“ de E. L. A.? Se oni ne agas plej severe, oni ne plu povas kontraŭstari la troamasigon de fuŝstilaj verkoj. La nacilingvaj verkoj havas sian kontrolon, kial ne ankaŭ la Esperantlingvaj? Kaj tiun ĉi kontrolon faru la eldonistoj, kiuj malakceptu manuskriptojn sen „vizo“ de E. L. A., ĉar E. L. A. estas kompetenta por tio!

Legado devas esti ĝuo, kvazaŭ ripozo. Sed legado de malbonstilaj verkoj estas naŭzo, estas eĉ peko kontraŭ la propra sento de l' belo; ilia aperigo estas malbonfaro, ja malĝentileco de l' verkinto-tradukinto kontraŭ la leganto. Siajn nekapablojn aŭ sian staton de komencanto la homo ne diskonigu per la presado; estas intimaĵoj, kaj ĉiu plej eble kaŝas siajn ĉiuspecajn netaŭgajojn, nesciojn kaj senvalorajn intimaĵojn. Oni per tio do ne malbonfamigu la Esperantan literaturon, ĉar ni ja havas jam sufiĉe da kontraŭuloj, kiuj spionas pri ĉiu nur iel trafbla kaj vundebla „Aĥilaĵo“!

Ni do prefere havu malpli da Esperantaj libroj, sed stile des pli da valoraj kaj taŭgaj. Per malbonstilaj legaĵoj ni povas konfuzi, eĉ forpuŝi la legantan komencanton aŭ ankoraŭ nespertulon; per bonstila verko ni povas lin allogi, perfektigi kaj per tiaj ĝuoj ankaŭ ĝojigi.

Ni do ne plu forgesu konsulti E. L. A.'on (Dresden-A., Nicolaistraße 18), antaŭ ol ni sendas nian literaturajn en la tutmondon! Kaj cetere la monĝajno ne estas grava, se pro fuŝstilo la libroj putras en la provizejoj de la eldonistoj!

Ni ĉiuj de nun laborigu E. L. A.'on — sed antaŭe ni tiusence laborigu nin mem! — kies stabo de spertuloj legas kaj korektas kaj laŭbezone akceptas aŭ rifuzas tute silente kaj tute nepublike la diversajn manuskriptojn kun kiu ajn enhavo aŭ temo.

Verkantoj-tradukantoj, precipe la novuloj, estimu la korektecon de nia lingvo kaj la honoron de nia tuta esperantliteratura movado!

El la vivo kaj sciencoj

Deklaro.

Ĉi tiu rubriko ne estas destinita sole por scienculoj, sed unuavice por laikoj, kiuj interŝiĝas pri diversaj aferoj el la vivo kaj sciencoj. Pro tio la stilo kaj la terminoj de la ĉi tie aperantaj artikoloj estas tiaj, ke ankaŭ mezinstruitaj legantoj komprenu ilin. Ni bone scias, ke en la sciencaj artikoloj unu aŭ alia esprimo estas anstataŭebla per pure scienca termino. Sed, se ne estas nepre necese, uzi tian scienca terminon, ni pli prefere elektas, pro la dirita kaŭzo, same bonan esprimon el la komuna lingvo. Tion bonvolu precipe atenti certa gazeto de niaj „lingvaj amikoj“, kiu elektis ĉi tiun rubrikon de G. E. kiel celtabulon por siaj mokoĵoj pri la neperfekteco de Esperanto. Kiu volas legi speciale sciencajn artikolojn, abonu je *Scienca Gazeto* (ĉe Ader & Borel, Dresden), kiu plene kontentigos ĉiun sciencemulon.

La redakcio.

Bona konsilo.

Ne ekiru vojon, se vi ne volas atingi la celon.

Vivado estas seninterrompa irado. La direkton kaj celon la naturo lasis al nia dispono; la haltadon nur sub la kondiĉo, ke per tio ankaŭ ĉesu la vivo. Do se ni volas vivi, ni devas antaŭeniri. Se ni kunigas nian pripensadon kun la vivoforto donacita al ni de la naturo, ni povas atingi elektitan celon kiel estroj pri ni mem kaj pri la fortoj de l' naturo. Se ni ne pripensas, la vento de l' hazardo pelas nin antaŭ si kiel objekton al iu direkto. Ni fordonis nian estran rajton; sed la ĉirkaŭstarantoj aljuĝas al ni la respondecon kaj ridas, se ni, kiel persekutita oferaĵo, petegas ilian kompaton.

Margarethe Kuhn, Berlin.
(Laŭ „Allgemeiner Wegweiser“.)

Rimarkindaj rekordflugoj de aviadistoj en Germanujo.

Antaŭ ne longe la piloto *Friedrich de Allgemeine Fluggesellschaft* (Generala Flugsocieto) supreniris de sur la flugokampo Johannisthal apud Berlin je la 8a kaj 12 matene, por plibonigi la rekordon de daŭro sen pasaĝero, kiun li mem antaŭe starigis. Li uzis monoplanon *Rumpler-Taube* (Kolombo laŭ Rumpler) kun 70-ĉevalforta *Mercedes*-motoro. Post la 12a tagmeze la aviadisto devis kontraŭbatali sufiĉe fortajn ventpuŝojn, kiuj lin tre lacigis. Li surterigis post 5 horoj kaj 18 minutoj kaj estis pliboniginta sian antaŭan rekordon je 8 minutoj. Por tiu ĉi flugo S-ro Friedrich ricevis el la „Nacia flugdonaco“ la destinitan por tiaj okazoj premion, kiu konsistis el po 1000 Markoj por ĉiu horo, do entute el 5000 Markoj.

La saman tagon, je la 12a kaj 56 tagmeze, la piloto *Sedlmayr* supreniris de sur la sama loko sur *Wright*-biplano kun 55-ĉevalforta motoro de N. A. G. (Nova Aŭtomobila Societo) por tuj superi la rekordon starigitan de S-ro Friedrich. Li restis en la aero ĝis la 6a kaj 59 kaj sekve starigis novan rekordon de 6 horoj kaj 3 minutoj. Per tio li profitis premion de 6000 Markoj el la „Nacia Flugdonaco“ kaj krom tio monatan renton de 2000 Markoj, kiun li ricevas ĝis tiam, kiam lia rekordo estos superata, sed ĉiuokaze ne pli longe ol ĝis la 1a de Januaro 1914.

Tria aviadisto, la militista piloto leŭtenanto *Canter*, starigis kelkajn tagojn poste du novajn mondrekordojn kun pasaĝero (leŭtenanto Böhmer) sur *Militär-Rumpler-Taube*. Leŭtenanto Canter, kiu estas konata per siaj brilaj flugoj dum la manovroj, supreniris kun sia pasaĝero matene de sur la militista flugokampo de Döberitz (proksime de Berlin). Ili flugis sen intersurteriĝo unue suden al Jüterbog, tie ili turniĝis kaj transflugis poste la okcidentan parton de Berlin laŭ nordokcidenta direkto kaj flugis al Lübeck. Farinte kelkajn bantoformajn flugojn super Eutin kaj Plön la „Kolombo“ surteriĝis bonstate proksime de Malente (apud Gremesmühlen en Holstein) post seninterrompa flugtempo de 6 horoj kaj 9 minutoj. La traflugita distanco estis 595 kilometroj.

Per tiu ĉi flugo leŭtenanto Canter unue superis la mondrekordon de distanco, kiun antaŭ ne longe la franco Guilleaux starigis pri transkampa flugado; plue la oficiro superis la mondrekordon de daŭro kun unu pasaĝero, kiun la angla leŭtenanto Barrington-Kennet starigis la 14an de Febr. kun 4 horoj kaj 51 minutoj. Leŭtenanto Kennet traflugis 401 kilometrojn.

La aviadilo kaj motoro uzitaj de leŭtenanto Canter estis germanaj produktaĵoj. *Eko.*

Brila flugo de franca aviadisto.

Preskaŭ nekredoblan flugon ĵus faris la piloto *Brindejone de Moulinaix*, unu el la plej eminentaj francaj aviadistoj. La 10an de l' nuna monato li transflugis en 10 horoj (14 horoj kun haltado) la mezan Eŭropon, t. e. de Paris ĝis Warszawa, surteriĝante dum la tuta vojo nur dufoje, en Wanne (Vestfalia) kaj Berlin. Li uzis tre malgrandan kaj malpezan *Morane-Saulnier*-monoplanon kun 80-ĉevalforta *Gnome*-motoro kaj flugis sen pasaĝero. La flugo okazis pro aspirado al la lasta premio de l' *Pommery*-pokalo.

La piloto supreniris matene je la 4a, ĉe bela vetero, de sur la flugokampo de Villacoublay apud Paris. Li prenis la direkton al Germanujo kaj estis je la 8a super Wanne, kie li surteriĝis. Post riparo de malgrava motordifekto li denove supreniris je la 9a kaj 55, kvankam la vetero pli kaj pli malboniĝis. En tiu tago regis en Germanujo fortaj ventegoj, kiuj blovis per rapideco de po 19 m en unu sekundo. Tamen la kuraĝa aviadisto bone atingis la flugokampon de Johannisthal apud Berlin, kie oni tute ne atendis lin. Nur iom pli ol tri horojn li restis tie. Intertempe la ventego fariĝis preskaŭ uragano. Tamen S-ro Brindejone daŭrigis sian flugon al Warszawa. Dek fortaj muntistoj preskaŭ ne povis haltigi la malgrandan aparaton, tiel la ventego skuigis ĝin. Kiu vidis ĉi tiun manovron, tiu certe

pensis, ke la forflugo estas trokuraĝa entrepreno, kaj spirite oni jam vidis la aparaton kaj la piloton disrompote refalintaj surteren. Sed nenio tia okazis. Kun admirinda lerteco kaj certeco la aviadisto estris sian malfortan maŝinon, kaj post kelkaj minutoj ĝi estis malaperinta antaŭ la rigardoj. Vespere je la 7a kaj 15 la kuraĝega flugisto atingis sian celon Warszawa kaj supezeble gajnis per tio la aspiritan premion.

Tiu ĉi flugo estas vere brila punkto en la ĝisnuna historio de la internacia aviado, precipe pro tio, ke la cirkonstancoj, ĉe kiuj la flugo okazis en Germanujo, estis tre malfavoraj. Kvankam ni ankaŭ en Germanujo havas kuraĝajn kaj kapablajn aviadistojn, tre verŝajne neniu el ili estus farinta la saman riskon. Malkaŝe ni devas konfesi, ke niaj francaj najbaroj ankoraŭ ĉiam superas nin en tiu ĉi fakoj. Sed la mirigaj ekzemploj de la francaj pilotoj estas kuraĝigaj por iliaj germanaj kolegoj, kiuj pli kaj pli perfektigaĝas en la ankoraŭ juna arto de l'flugado.

Eko.

≡ Por kolektantoj ≡

Katalogo pri Esperantaj sigelmarmarkoj.

Mallongigoj: E: eldonita; A: acetebila ĉe; F: formato; Gr: grandeco de l' bildo (horizontale × vertikale); Pp: papero; Pr: prezo po 100 pecoj; Ss: subspeco aŭ vario; T: teksto; d, md: dekstre, maldekstre; pf: perforita (dentita); s, ms: supre, malsupre.

(Daŭrigo.)

d) Francujo.

1911.

E: Burgonja federacio. A: Balandra & Royer, Chalon s. S. Vidajo de Chalon, super ĝi md Esp.-stelo. T: Federacio de la Esperantistaj grupoj Burgonjaj. IVa kongreso 20, 21 majo 1911 Chalon s. Saône (Francujo), sub la bildo (tre malgranda) la nomo de la presisto: Balandra & Royer, Chalon s. S. Fundo blua, T blanka, bildo kaj stelo verdaj, Pp blanka. F: rektangula. Gr: 30×41 mm, pf 11.

1. Blua, verda.

E: Esp.-grupo Limoges. A: Balandra & Royer, s verda Esp.-stelo kun blankaj radioj, ms d blazono de Limoges. T blanka sur verda fundo: Esperantista federacio de Sudokcidenta Francujo. 2a kongreso 4—5 junio 1911 Limoges, sub la bildo T kiel ĉe 1). F: rektangula. Gr: 26×37 mm, pf 11.

2. Verda.

E: Centra-okcidenta federacio. A: Le Bihan, Le Mans (Sarthe), Pr 2,000 Sm. Virina figuro apud ŝtono kun verdaj Esp.-stelo kaj la literoj G. E. S., md ms vidajo de la urbo, md s blazono de Le Mans. Enskribo en la kadro md: Tria Esperantista kongreso, d: Federacio Centr-Okcidenta, s: Le Mans (Francujo), ms: 4—5 junio 1911. F: rektangula. Gr: 32×58 mm, pf 11.

- a) *Blue presita sur:* b) *Ruĝe presita sur:*
 3. Pp rozkolora. 12. Pp rozkolora.
 4. " rozflava. 13. " rozflava.
 5. " flava. 14. " flava.
 6. " ĉamkolora. 15. " ĉamkolora.
 7. " helblua. 16. " helblua.
 8. " verda. 17. " verda.
 9. " blua. 18. " blua.
 10. " violkolora. 19. " violkolora.
 11. " griza. 20. " griza.

c) *Nigre presita sur:*
 21. Pp blanka.

La samaj markoj, franca T, md: Troisième congrès Esperantiste, d: de la fédération du centre ouest, s: Ville du Mans, ms: 4 et 5 juin 1911.

- a) *Blue presita sur:* b) *Ruĝe presita sur:*
 22. Pp rozkolora. 31. Pp rozkolora.
 23. " rozflava. 32. " rozflava.
 24. " flava. 33. " flava.
 25. " ĉamkolora. 34. " ĉamkolora.
 26. " helblua. 35. " helblua.
 27. " verda, 36. " verda.
 28. " blua. 37. " blua.
 29. " violkolora. 38. " violkolora.
 30. " griza. 39. " griza.

c) *Nigre presita sur:*
 40. Pp blanka.

1912.

E: Burgonja federacio. A: Balandra & Royer. d s Esp.-stelo kun blankaj radioj, d ms vidaĵo de la urbo, md ms blazono de Tournus. T: Federacio Esperantista de „Bourgogne“ kaj „Jura“. Va kongreso Tournus (Francujo). 26 u. 27 majo 1912, sub la bildo T kiel ĉe 1). Fundo violkolora, bildo kaj stelo verdaj. T kaj blazono blankaj, Pp blanka. F: rektangula. Gr: 45×34 mm, pĝ 11.
 41. Violkolora, verda.

(Daŭrigota.)

Dro. Möbusz.

Korekto.

La enskribo ĉe A I 14 (G. E. 3 B p. 44) ne estas „Esperanto“, sed „Antverpeno“.

Diversaj komunikoj

Distingoj al Dresdenaj samideanoj.

Du fervoraj anoj de Societo Esperanto Dresdeno estis honore distingataj okaze de la naskiĝtago de l'reĝo de Saksujo:

S-ro komerca konsilanto bankisto *Arnhold* ricevis la titolon *sekreta* komerca konsilanto, kaj S-ino reĝa operkantistino *Minnie von Frenckell-Nast*, la edzino de l'afergvidanta prezidanto de G. E. A., ricevis la oran medalon *Bene merentibus*.

Germana Esperantisto kore gratulas la honoritojn!

Internacia Esperantista Semajno-Kongreso.

Gent, 14a—20a de Aŭgusto 1913.

Jam pli ol 200 geesperantistoj sendis aliĝon; do ni povas certigi, ke la Internacia Esperantista Semajno-Kongreso havos grandan sukceson. Kelkaj grupoj prave pensis, ke la kotizajo ne sufiĉos por egaligi la elspezojn. Tial ili sendis al ni monferojn, kiujn ni danke akceptis. Ni esperas, ke tiu ĉi ekzemplo trovos imiton.

Loĝado: La organiza komitato starigis komisiitaron por loĝado, kiu enregistros la lueblajn ĉambrojn. La esperantistoj, kiuj deziras jam mendi ĉambrojn nur por kelkaj tagoj, bonvolu skribi al la direktorino de la loĝada komitato, *F-ino R. Schepens, Karel Lodewijk Diercksstraat 14, Gent*. La komitato tuj klopodos plej bone kontentigi ĉiujn mendantojn.

Eldonaĵoj de la Internacia Esperantista Semajno-Kongreso.

Ĉiuj aliĝintoj, kiuj sendis frs. 2.50 = Sm. 1.000 kiel simplan kotizajon, ricevos dum sia ĉeestado diversajn kartojn, enirkarton por la Universala Ekspozicio, enirkartojn por la festoj, kunvenoj, paroladoj, detalajn programojn, luksan ilustritan kongreslibron, ktp. La kongreslibro konsistas el: Historio de Esperanto en Belgujo, detalaj programoj, plena nomaro de la kongresanoj, gvidlibro por la vizito de Gent, planoj kaj ilustraĵoj, priskribo de la Genta Universala kaj Internacia Ekspozicio kun ilustraĵoj ktp.

Ni eldonis reklamglumarkojn pri la Esperantista Semajno-Kongreso. Ili kostas, po 100 ekzempleroj en unu koverto, frs. 1,00 = Sm. 0.400. Oni bonvolu ilin mendi kaj aldoni la monon al la mendo, aŭ postmandate, aŭ en respondkuponoj, skribante al *S-ro Arthur Vermandel, Borgerhoutschestraat, 72, Antwerpen*. Rabato de 25% estos donata al la disvendistoj, kiuj mendos minimume 10 kovertojn.

Serio da 12 belaj kolorigitaj poŝtkartoj, kun vidaĵoj de la Ekspozicio (sola oficiala eldono) kostas frs. 0.50 = Sm. 0,200 (poŝtelspezoj plie), samaj kondiĉoj por la disvendistoj; mendeblaj ĉe la sama adreso.

La komitato.

≡ Bibliografio ≡

Ĉiuj libroj markitaj per steleto estas riceveblaj per:
 Ader & Borel G. m. b. H., Esperanto-Verlag, Dresden-A. 1,
 Struvestraße 40.

(La montritaj prezoj ne entenas la sendkostojn.)

Ĉi tie ni recenzas nur verkojn duoble ricevitajn.

* *La nigra galero.* De *Wilhelm Raabe*. Esperantigita el germana lingvo de Dr. phil. *Fritz Wicke*. (Internacia Mondliteraturo No. 4.) — Central-Verlag für Esperanto und Stenographie, Magdeburg. 0.500 Sm.

En la jaro 1599, t. e. en milito inter la Nederlandoj kaj Hispanujo, la nigra galero estis la plej timata de la hispanoj holanda ŝipo. La verko estas

bela pruvo pri la lerta rakontarto de Raabe. Viglaj scenoj plene malliberigas la atenton de la leganto. La esperantlingva teksto ĝenerale respondas al la originalo. Kelkfoje oni konstatas, laŭ mia opinio, la germanlingvan tradukinton. Ekz. pĝ. 10: *elĉerpita* ĉevalo; cetere — en la sama frazo la konjunkcio estu „kiam“, ne „ke“; pĝ. 11: *timemaj* okuloj; pĝ. 26: *kelkunu*; eraro estas sur pĝ. 15: kiel honestulo; oni diru aŭ *kiel honestulon* aŭ „honestulo“; pĝ. 25: „*for piedbatis* la admiralo“ ŝajnas komprenebla nur al germanlingvanoj; la militon kun *siaj* teruroj estas eraro, ktp. Ankoraŭ pliajn nekorektaĵojn mi trovis kaj kelkajn neordinarajn esprimojn (embuski pĝ. 13. koncepcio pĝ. 20, hiperborea pĝ. 22, nuabro p. 32, kaj ne ĝuste aplikitajn vortradikojn (pĝ. 66: la flago *blovas*; pĝ. 64: estos mortinta *dum* unu horo). Fine stranga ŝajnas al mi la uzo de „Wilhelmo“. Mi bedaŭras, ke tiaj nekorektaĵoj igas la libron netaŭga legajo por komencantoj, kaj ke la leganto tiel ofte estas atentigata pri nekorekta esprimo. Spite ĉion — lerta (sed nur tia!) esperantisto povas legi ĉi tiun tekston ĝuante, ĉar lin ne malhelpas la cititaj makuloj.

Arnold Behrendt.

* **Vollständiges Lehrbuch der internationalen Hilflsprache Esperanto.** Kurzer und leichtfaßlicher Lehrgang für den Kursusunterricht und zum Selbststudium von *Dr. A. Möbusz*, Seminardirektor in Lübeck (Zweite vermehrte und verbesserte Auflage.) 102 S. 15×22 cm. — Otto Nemnig, Leipzig. Pr: kartoniert 0.95 M. [101]

* **Schlüssel zum Lehrbuche von Dr. A. Möbusz,** nebst Anleitung zu seinem Gebrauche. 48 S. 15×22 cm. — Otto Nemnig, Leipzig. Pr: kartoniert 0.70 M. [102]

La unua eldono de tiu ĉi lernolibro disvendiĝis en mallonga tempo; tio pravas, ke la libro akiris la simpatian de la germanaj esperantistoj. Kaj nun ĝi meritas tion tiom pli, ke la nova eldono estas ankoraŭ plibonigita en pli ol unu punkto; precipe plaĉas la bonaspekta eksterajo, pri kiu zorgis la nova eldonejo, en kiun la libro nun transiris. La enhavo estas pli riĉa kaj pli bone aranĝita ol en la unua eldono, la donitaj ekzercoj estas interesaj kaj la gramatikaj klarigoj tre koncizaj, tiel ke la studado de nia lingvo laŭ tiu ĉi libro ne tedas la lernanton. Precipe ĝi taŭgas por meminstruo, kaj por tio helpas multe la bonege prilaborita ŝlosilo. Ika.

La verda kakatuo. Unuakta groteskajo de *Artur Schnitzler*. Tradukita de *Joh. Schröder*. — Komisie ĉe Druckerei- und Verlags-Aktiengesellschaft vorm. R. v. Waldheim, Jos. Eberle & Co., Wien. 0.750 Sm.

La nomo de l'aŭtoro estas sufiĉe konata en la literatura mondo; malpli konata estas ĉi tiu groteskajo, kvankam ĝi sendube estas unu el la majstraĵoj de Schnitzler. La dramo sin prezentas kiel antaŭtakto al la bruega franca revolucio. Mallongaj scenoj kun fortaj ekbatoj! Incita drameco!

La tradukinto meritas nian dankon, ke li diskonigis per sia laboro tian verkon inter la tutmonda esperantistaro. La traduko ebligas ĝui la verkon, t. e. ektremi kaj ektimi. Ĝenerale la stilo estas bona. Kelkloke oni renkontas neordinarajn formojn, ekz. sur paĝo 10: iela; pĝ. 50: ravindaĵo (?); pĝ. 55:

ni konas *nin* (unu la alian); pĝ. 60: enŝanceliras (? ŝanceliĝe eniras). La vorto „mirinda“ estas uzata ankaŭ neĝuste de la tradukinto, ekz. sur pĝ. 23: super ni la mirinda ĉielo; la ĉielo estas „admirinda“; sur paĝo 54: Ĉu tio estas io tiom mirinda? La frazo montru „miriga“; sur paĝo 63: tio estas mirinda hazardo; la hazardo estas jen admirinda, jen miriga, jen stranga; sur paĝo 59: estas mirinde ktp., la priparolata afero estas miriga.

Mi konfesas, ke mi ekkaptis la okazon por montri, ke la vortformo „mirinda“ ne estas rekomendinda, kvankam ĝi estas tre ofte uzata. La ĝenerala uzo senkulpigas la tradukinton, sed pravigas la recenzanton, eldiri sian opinion.

La verda kakatuo enflugu en ĉiun esperantistan hejmon; ĝi meritas bonan akcepton!

Arnold Behrendt.

Leichtfaßlicher methodischer Lehrgang der Esperantosprache für Kurs- und Schulgebrauch sowie zum Selbst-Unterricht. Von Lehrer *Taubmann*. 128 Seiten 12¹/₂×20¹/₂ cm. — Verlag: „La Marto“, Haida (Böhmen). Pr: 1.50 Kr., geb. 2.30 Kr. [85]

Schlüssel zum leichtfaßlichen Lehrgange der Esperantosprache. Von Lehrer *Taubmann* (s. oben). — Preis nicht angezeigt. [86]

Jam ofte estas klarigitaj la kaŭzoj, kial estas senutile, ja kelkfoje eĉ malutile, eldoni unu novan lernolibron post la alia. Se mi tamen konsente salutas la priparolatan libron, tio estas la plej certa signo por tio, ke ĝi estas vere bona. Kion mi speciale volas laŭde akcenti, tio estas la simpleco, koncizeco kaj klareco de la libro. Per la plej simplaj rimedoj, ne amasiginte regulon al regulo, la verkinto donas ĉion necesan de Esperanto, sed eĉ ne unu literon pli. La ekzercoj estas entute lerte elektitaj; mi aprobas ankaŭ plene la enkondukantajn parolojn de profesoro Fuchs, kiu diras: „La tutan libron traigas bonefika spirito de vigleco, kiu certe ankaŭ vigliĝe reefikos al la lernanto“. — koncerne la eksterajn, la preso kaj papero povus esti iom pli bonaj; kontraŭe la komposto estas klare aranĝita. — Kelkaj malgrandaj pres- kaj tradukeraroj estus korektotaj.

La *ŝlosilo* enhavas la respondantajn solvojn de la taskoj. Nebelajoj: *do* anstataŭ *ja*; *kien* ankaŭ anstataŭ *kien ajn*. Por meminstruo tiu ĉi lernilo estas rekomendinda. Lr.

Vollständiges Elementar-Lehrbuch der internationalen Welthilflsprache Esperanto für Schul-, Kursus- und Selbstunterricht. Mit Anschauungsbildern. Bearbeitet von *Guido Otto*, Lehrer. 128 Seiten 12¹/₂×18 cm. — Alfred Hahns Verlag, Leipzig, Johannissgasse 3. Pr: Brosch. 1.60 M., in Leinen geb. 2.— M. [76]

La aŭtoro kompreneble estas certa, ke lia verko estas nepre necesa kaj multe pli bona ol la ĝis nun ekzistantaj. Laŭ mia opinio ĝi ne estas tiom taŭga. El principa vidpunkto mi ne ŝatas la amason da vortoj, kiuj enestas en la lecionoj, sed kiujn lernanto neniom bezonas. Ankaŭ la gramatiko estas malsimple traktita. Kelkaj vortoj estas malĝuste tradukitaj, ekz. *viando* anstataŭ *karno*, *malsaneco* Krankheit, *inter* unter (nur kelkfoje!), *jaketo* Jackett, *finigi* beenden, *super* oben, *rembur* Polster, *ŝanceli* wanken. Plue ni trovas arĝon da gramatikaj eraroj,

tute falsan klarigon pri *sia* kaj laŭ tiu klarigo fuŝuzon, neĝustan aplikon de la participoj, tre malfeliĉe elektitajn ekzemplojn: (*Salutote, la sinjoro perdis sian ĉapelon*), gramatikajn pekojn kiel: *pro almozpeti* oni kaptis lin. Fine enestas multaj preseraroj. Do bonkonsciencie mi ne povas rekomendi tiun ĉi libron. — La bindo estas bona. *Lr.*

Pri estetiko en medicino. De *Dro Heliodor Swiecicki*. El pola lingvo tradukis *Mieczyslaw Czerwinski*. (T. E. K. A.-Biblioteko No. 1.) 34 paĝoj 11¹/₂ × 16¹/₂ cm. — Eldonejo de „Kuracisto“, Warszawa (Varsovio), str. Szopena No. 1. 0.300 Sm. [72

Rekomendinda libreto same por kuracistoj kiel por laikoj. Certe la aŭtoro estas prava: „kuracisto devas esti psikologo, scienculo, poeto, oratoro, diplomato, filantropo, kaj — — — artisto!“ — „Li devas ne nur koni la homojn, sed kunsenti kore iliajn sentojn, kompreni ĉion, kio havas por homo gravan signifon.“ — „En lia koro neniam devas elĉerpiĝi la oro de kompatato, *incenso* de kunsento, kaj *mirho* de kompreno de suferoj.“ — Bonaj vortoj! Jen la plej bona kuracilaro! Sed ĉu oni ofte renkontas la kuraciston-artiston? Bedaŭrinde ne! Kaj ofte ankaŭ adiaŭis la artisto la kuraciston pro la ĉiutaga malfacila penado, kiu ofte ne liveras eĉ nur la plej malgrandan, nepre necesan porvivaĵon.

Estas vera ĝojo, ke oni per Esperanto povas internaciigi tiel facile kaj por ĉiu nacio sambone kompreneble la plej delikatajn sentojn.

Dro Br.

Lernolibro de la plej simpla kaj plej facila Esperanta Stenografio de Ludoviko Jakab. 1a parto: Elementa Stenografio. (Internacia Esperanta Stenografia Biblioteko No. 1.) — Havebla ĉe la verkinto, Budapest I, Mészáros- u. 19. 0.200 Sm. [58

La sistemo estas tre simpla. La plejmulto de la signoj estas el la sistemo Gabelsberger, sed oni vidas ankaŭ la influon de la sistemo Faulmann. La signoj por la vokaloj, kiujn oni skribas efektive, estas bone skribeblaj, tion oni ne povas diri pri ĉiuj signoj por la konsonantoj kaj kunligoj. La teorio de l'sistemo estas pripensinda, kaj se la verkinto plibonigus diversajn regulojn, la sistemo ankaŭ fariĝus rekomendinda. Jen bona kampo por la kreo de universala Esperanta stenografio. *Wallon.*

Esperanta-Pola kaj Esperanta-Litova Bibliografio 1887—1912. Kunmetita de *Z. Adam*. 64+4 pĝ. 12 × 19 cm. — Presejo L. Boguslawski, Varsovio, Świetokrzyska 11. 0.400 Sm. [83

Traleĝante ĉi tiun utilan libreton oni kun miro vidas, kiom da verkoj, koncernantaj Esperanton, jam ekzistas en la teritorioj de la du nomitaj lingvoj, precipe en la pola! S-ro Adam faris tre zorgan laboron. Laŭ kronologia ordo li citas la aperintajn librojn, kiuj dividiĝas laŭ diversaj klasoj. Krom la preciza titolo li montras ankaŭ la karakteron de la libroj, iliajn eldonejojn, grandecon kaj amplekson. En specialaj listoj li fine klasigas la librojn laŭ enhavo kaj registras la aŭtorojn kaj tradukintojn. La aldono enhavas la titolojn ktp. de la propraj verkoj de l'aŭtoro. La libro estas vere rekomendinda por verkantoj kaj tradukantoj esperantistaj. *Ebo.*

Por lertuloj

Enigmoj kaj problemoj.

No. 16.

Kun **a** mi ne povas esti sola,
kun **e** mi estas nur malgranda,
kun **i** ĝin faras homoj ĉiutage,
kun **o** mi estas tre valora,
kun **u** mi estas iama besto. *Erka.*

No. 17.

	1	2	3
1	sko	sko	kre
2	lo	lo	pi
3	po	pu	pu

Aranĝu la silabojn tiel, ke la horizontalaj kaj vertikalaj vicoj montru: 1. staton de la lumo, 2. parton de la okulo, 3. birdon. *A. Br.*

No. 18.

- 1 2 3 4 5 6 = skribajo
2 3 4 5 6 = subtila fluidaĵo
3 4 5 6 = astro
4 5 6 = malgranda parto
5 6 = greka litero
6 = vokalo. *Kobo.*

En la venonta numero de eldono B ni publikigos la solvojn de la ĉi-supraj problemoj; la legantoj bonvolu sendi la solvojn, **skribitajn nur sur poŝtkarto sen iu alia komuniko**, ĝis la 5a de l' venonta monato al nia redaktoro, **S-ro Friedrich Ellersiek, Berlin S. 59, Wissmannstr. 46.** — Tri el la solvontoj ricevos libropremion, kiun ili povos elekti el la katalogo de nia eldonejo. (*Valoro po premio ĝis 1 Sm.*)

Solvoj el la antaŭa numero.

No. 13.

f	r	a	k	o
k	i	a	l	o
o	n	k	l	o
a	g	a	t	o
r	o	n	d	o

No. 14.

Oro	ne	en	laste
kvar	tago	salo	ovoj
caro	sukoj	mem	ja
el	plu	ien	nek

Okcent spesmitojn kaj en monujo el oro.

Rimarko: En la donita tasko bedaŭrinde troviĝis eraro: la dek-kvina vorto ne estas pronomo, sed *konjunkcio*. Sed, neatentite ĉi tiun malgravan eraron, estas strange, ke neniu lertulo solvis ĉi tiun ŝercenigmon. Ĉu ĝi estis tro malfacila, aŭ ĉu niaj amikoj kredis, ke ni volis moki ilin? La unuan ni ne kredas, kaj la alian ni certe ne intencis. Do, kia estis la kaŭzo?

Red.

No. 15.

Mus-kato.

Ĝustajn solvojn sendis:

A) de du numeroj: Don Mansueto Biscaglia, Mezocorona (Tirolo); Max Butin, Godesberg; Max Fischer, fervojasistanto, Engelsdorf-Leipzig; F-ino Margarete Lachmund, Leisnig.

B) de unu numero; E. Momber, Honnef.

Ĉar neniu sendis 3 solvojn, ni decidis aljuĝi premiojn al du el la solvintoj de du numeroj. Ili estas: Don Mansueto Biscaglia, Mezocorona kaj F-ino Margarete Lachmund, Leisnig.

La gajnintoj bonvolu sciigi nian eldonejon Ader & Borel G. m. b. H. en Dresden, Struvestr. 40, pri la libroj, de ili dezirataj.

≡ Redakciaj respondoj ≡

Al S-ro Godeano. Via „juĝa decido“ tre amuzis nin. Por ke ankaŭ niaj legantoj havu la saman plezuron, ni plene publikigas la decidon, en piednoto aldonante niajn rimarkojn pri ĉiu paraĝo de la decido:

Decido.

- En la afero kontraŭ la redaktoro de Germana Esperantisto la dezirita pardono (kp. Nro 5 B pĝ 77) estas donata.
- Estu klarigote, kiam S-ro Godeano diris enigmon ne sufiĉe klara kaj komprenebla.

Noto: La iama disputo de S-ro Godeano kun la redaktoro de G. E. pritraktis la demandon, ĉu ĝustan solvon de enigmo oni rajtas deklari neĝusta nur pro tio, ke la proponanto de la enigmo celis alian solvon. — Sed alia Godeano, S-ro Momber-Honnef (Rhein), iam plendis pri neklareco de enigmo (mil, limo, mielo). Se S-ro la redaktoro de G. E. intermiksas ĉi tiujn du aferojn, estas proponata al lia pripensoj jena rezonado:

La enigmo „mil-mielo“ volis laŭ sia karaktero prezenti al la solvontoj bazon tute klaran kaj precizan (same ekz. n-oj 13 kaj 14 en 5 B). Kontraŭe ĉe la enigmo „Karolino—Karulino“ estis ĝia celo, esti neklara, ĉar la tasko de la solvontoj estis, forigi tiun neklarecon (kp. Seinen, Rät-selkunst, 2a eldono, pĝ 461). Sekve ĉe enigmoj de la unua speco oni rajtas postuli plenan klarecon kaj unusencecon, kontraŭe ĉe enigmoj de la dua speco nur tiugradan klarecon, ke la solvado estu ebla. Ke Karolino plenumis tiun postulon, montras la fakto, ke eĉ ne-godeanoj solvis ĝin.

3. Templimo por la plenumo de tiu ĉi dispono: apero de G. E. 6 B. „Godeano“, alie Arntz.

Rimarkoj:

- Kun danko akceptite!
- Efektive ni intermiksas la du Godeanojn kaj petas pardonon pri nia eraro. Tamen ni insistas pri tio, ke la „decidodonto“ estas malprava; ni devas konservi la tiam esprimitan opinion. Krom tio ni ne povas konsenti pri la nuna rezonado, kiun ni — tion ni devas konfesi — ne sufiĉe bone komprenas. Cetere krom la Godeanoj nur 2 aliaj lertuloj trovis la ĝustan solvon de la dirita enigmo.
- La plenumo okazis, kaj per tio la lasta vorto estas dirita en tiu ĉi afero.

Al S-ro J. M. en S. Viajn demandojn faritajn al S-ro Neniu plej bone respondas la solvo de la koncerna enigmo kaj — la vortaro de Kabe. Koran saluton!

Samideanoj!

**Vi nepre devas viziti la kongresojn en
Stuttgart kaj Bern!**

Geschäftliche Mitteilungen.

Das Ostseebad Zoppot, das den Teilnehmern des vorjährigen deutschen Esperanto-Kongresses noch in angenehmer Erinnerung sein wird, rüstet sich zum Empfang seiner Gäste. Seit der vorigen Saison neu entstandene Hotels, Pensionen und Privathäuser, mit allem Komfort der Neuzeit ausgestattet, stehen zur Aufnahme einer weit größeren Anzahl von Kurgästen als bisher zur Verfügung. Im Kurgarten ist ein zweites Orchester errichtet, die Terrassen sind zweckentsprechend umgebaut worden, und noch manche andere Neuerung ist zu verzeichnen, die von den zahlreichen Gästen mit Freuden begrüßt werden dürfte.

Die über die Grenzen der Provinz hinaus berühmt gewordene Zoppoter Sportwoche vom 6. bis 13. Juli wird auch dieses Mal ein reichhaltiges Programm bringen; fast alle Sportarten werden in Wettkämpfen vorgeführt werden. Unter anderen interessanten Veranstaltungen findet Ende Juli und Anfang August die Aufführung des Zigeunerbarons auf der Naturbühne im Walde statt.

Soeben ist der von der städtischen Badeverwaltung in geschmackvoller Ausstattung herausgegebene Prospekt erschienen, der mit jeder gewünschten weiteren Auskunft, im besonderen auch über Wohnungsangelegenheiten, von der Badeverwaltung jedem Interessenten kostenlos übersandt wird.